

19

La Arbo De La Morto

Dum mi faris tiujn pripensojn, estis malheliĝinta, kaj antaŭ la tendo komencis lumi la fajroj, sur kiuj la *squam*-oj pretigis la vesperajn manĝaĵojn. Denove estis „Malhela Haro“, kiu alportis mian manĝaĵon kaj akvon al mi. Ŝi certe persvadis sian patron lasi sin doni la permeson de Tangua pro tio. Tiun fojon ni ne interparolis. Nur kiam ŝi foriris, mi dankis al ŝi. Post tiuj miaj gardistoj estis anstataŭigataj de du aliaj, kiuj ne traktis min pli malamikece ol la antaŭaj. Mi demandis ilin, kiam mi kuŝiĝu, kaj ili diris, ke Pida estis venonta pro ĉeesti dum tio.

Unue sed venis, anstataŭ la juna ĉefo, iu alia per dignoplenaj, malrapidaj paŝoj — „Unu Plumo“, la patro de mia flegantino. Li stariĝis antaŭ mi, silente rigardis min certe tutan minuton, kaj tiam ordonis al la gardistoj:

„Miaj fratoj foriĝu, ĝis mi vokos ilin! Mi volas paroli kun la palvizaĝo.“

Ili tuj obeis, li do certe estis alta aŭtoritatulo inter la kajovajoj, kvankam li ne estis ĉefo. Kiam ili forestis, Sus-homaŝa sidiĝis antaŭ mi, kaj denove pasis kelka tempo, antaŭ li komencis solenece:

„La palvizaĝoj loĝis sur la alia flanko de la granda akvo. Ili havis sufiĉan landon. Tamen ili transvenis, pro rabi niajn montojn, valojn kaj ebenaĵojn.“

Post tio li silentis. Liaj vortoj estis laŭ indiana maniero enkonduko, per kiu mi konkludis, ke li devis intertrakti ion gravan kun mi. Kio povis esti tio? Mi preskaŭ antaŭsentis ĝin. Li certe ekspektis respondon de mi. Sed mi silentis, kaj tiel li pluis post paŭzo:

„Ili estis akceptitaj gastamece de la ruĝaj viroj, sed rekompencis tiun gastamecon per ŝtelo, rabo kaj murdo.“

Denove paŭzo.

„Ankoraŭ hodiaŭ ili nur intencas trompi nin kaj peli nin ĉiam pli malantaŭen, kaj kiam ili sukcesas tion ne per firuzeco, ili uzas perforton.“

Refoje paŭzo.

„Kiam ruĝa viro vidas blankulon, li povas esti certe, ke li havas ĝismortan malamikon antaŭ si. Aŭ ĉu estas palvizaĝoj, kiuj ne estas niaj malamikoj?“

Mi certe rimarkis, al kiu li celis per tiu enkonduko, fakte al mia persono, al mi mem. Kiam mi ankaŭ tiufoje hezitis fari respondon, li elparolis la malkaŝan demandon:

„Ĉu Old Shatterhand ne volas respondi al mi? Ĉu la blankuloj ne traktis nin tiel?“

„Jes, ‚Unu Plumo‘ pravas“, mi konfesis.

„Ĉu ili ne estas niaj malamikoj?“

„Ili estas.“

„Ĉu eble inter ili estas kelkaj, kiuj ne havas malbonajn intencojn pri ni kiel la aliaj?“

„Estas kelkaj.“

„Old Shatterhand nomu unu el ili!“

„Mi povus diri al vi plurajn, eĉ multajn nomojn, sed mi volas rezigni pri tio, ĉar kiam vi malfermas la okulojn, vi vidos unu el ili starante antaŭ vi.“

„Mi nur vidas Old Shatterhand:on.“

„Pri tiu mi parolas.“

„Do vi nomas vin mem blankulo, kiu ne agas tiel malamikece kontraŭ ni kiel la aliaj? Ĉu vi ne plurfoje mortigis kaj lezigis?“

„Jes, sed nur tiam, kiam oni devigis min. Mi ja ne estas, kiel diris viaj vortoj, difinita malamiko de la indianoj, sed mi estas sincera amiko de la ruĝa raso. Tion mi ofte pruvis. Aĵn kiam mi povis, mi helpis al la ruĝuloj, kaj defendis ilin antaŭ ĉio ankaŭ dum la atakoj de la palvizaĝoj. Se vi volas esti juste, vi konfesu tion.“

„Unu Plumo justas.“

„Do mi volas daŭrigi mian pruvon. Pensu pri Winnetou! Ni estis kiel amikoj kaj fratoj unu al la alia! Ĉu Winnetou ne estis ruĝa viro?“

„Li estis, kvankam malamiko de ni.“

„La apaĉo ne estis via malamiko, sed vi estigis lin via malamiko. Kiel li amis siajn apaĉojn, tiel li amis ĉiujn indianojn. Li ĉiam intencis vivi en paco kun ĉiuj, kaj krei pacon ĉie, sed liaj ruĝaj fratoj preferis disŝiri la karnon de la aliaj kaj malfortigi ilin mem. Tio estis lia prizorgo, lia aflikto, kiu neniam forlasis lin. Kaj kion li sentis kaj pensis, tion ankaŭ mi sentis kaj pensis. Ĉiuj niaj agoj venis el la amo kaj la zorgo, kiun ni havis pri la ruĝa raso.“

Mi estis parolinta same malrapide kaj solenece kiel li. Kiam mi nun silentis, la kajovajo mallevis la kapon, kaj tiel sidadis silente kelkajn minutojn. Tiam li relevis ĝin kaj diris:

„Old Shatterhand diris la veron. Sus-homaŝa estas justa kaj koncedas la bonon eĉ al sia malamiko. Se ĉiuj ruĝaj viroj estus tiel, kiel Winnetou estis, se ĉiuj palvizaĝoj agus laŭ la ekzemplo, kiu Old Shatterhand estas al ili, tiukaze la ruĝaj kaj la blankaj popoloj vivus flanke de la alia kiel fratoj, amus kaj helpus unu al la alia, kaj la tero havus sufiĉan spacon por ĉiuj ĝiaj infanoj. Sed estas danĝere doni ekzemplon, laŭ kiu neniu povas agi: Winnetou ekmortis, trafite de kuglo de malamiko, kaj Old Shatterhand estas torturota ĝismorte.“

Nun li havis la interparoladon ĵus je la punkto, je kiu li estis intencinta direktigi ĝin. Mi pensis ĝin esti ne konsilinde veni renkonti al li. Tial mi silentis. Li do pluis:

„Old Shatterhand estas heroo. Li devos suferi multajn kaj egajn turmentojn. Ĉu li faros la plezuron al siaj enviantoĵ vidi lin malforte?“

„Ne. Se mi iam mortiĝu, mi iros en la morton kiel viro, al kiu oni rajtas starigi tombon per honoro.“

„Se vi iam mortiĝu, ĉu? Ĉu vi dubas pri via baldaŭa ekmorto?“

„Jes.“

„Vi estas tre sincere!“

„Ĉu mi mensogu al vi?“

„Ne. Sed tiu sincereco estas tre danĝera al vi!“

„Old Shatterhand neniam malkuraĝis.“

„Vi do esperas povi fuĝi?“

„Jes.“

Tiu sincereco estis eĉ multe pli miriga al li ol la antaŭa.

„Uf, uf!“ li elpuŝis, levante ambaŭ manojn.

„Ĝis nun vi estis traktita indulge. Oni montru al vi pli da rigorecon!“

„Mi ne timas rigorecon, ĝi ne timigas min. Des pli mi fieras, ke mi ne forsilentis la veron de vi.“

„Nur Old Shatterhand povas havi la riskemon diri tiel sincere, ke li intencas fuĝi. Tio ne nur estis kuraĝege, sed riskeme!“

„Ne. Riskemulo agas aŭ ne per klara prudento aŭ despere, ĉar al li nenio perdeblas plu. Mia sincereco sed havas bonan kaŭzon kaj certan celon.“

„Ĉu celon?“

„Jes. Mi ne povas diri ĝin al vi, sed vi ekkonu ĝin mem.“

Kion mi ne devis diri al li, estis tio: li venis tutcerte pro savi min, per ke li ofertis al mi sian filinon kiel edzino. Se mi akceptus tion, mi ne estus mortigota, sed ricevus mian liberecon kaj kune junan virinon, sed devus estiĝi kajovajo. Tion mi ne povis akcepti. Mi do estis devigita rifuzi la ofertan de „Unu Plumo“, kio ne nur devis ege ĉagreni lin, sed ankaŭ pleniĝi lin per vengavido. Pro eviti tion, mi diris maldekorite, ke mi ne pensis mian ekmorton esti tiel neeviteble kiel pensis li. Tio signifis: ne ofertu vian filinon al mi, ĉar mi ankaŭ saviĝos sen estiĝi edzo de indianino! Kiam li komprenis tiun indikon, li povis eviti la ofendon, kaj mi lian malamon kaj lian vengon. Li ankaŭ vere pripensis, sed bedaŭrinde ne ekhavis la ĝustan penson, ĉar li diris ruze supere:

„Old Shatterhand nur volas zorgigi nin pri li, kvankam li scias, ke li ne povos fuĝi. Li pensas, ke estas sub lia digno konfesi, ke li pereu. Sed Sus-homaŝa ne lasas sin trompi. Vi scias ekzakte, ke vi ekmortu.“

„Mi scias ekzakte, ke mi fuĝos!“ mi insistis.

„Vi estos torturata ĝismorte“, li asertis.

„Mi forsaviĝos!“

„Fuĝo neblas, ĉar se Sus-homaŝa pensus, ke ĝi eblus, li mem sidiĝus tie ĉi pro gardi vin. Do vi ne forsaviĝos, sed ke vi evitos la ekmorton, pro tio fakte ekzistas ŝanco.“

„Kiu?“ mi demandis, ĉar la ruĝulo ne deturnebligis de tio.

„Per mia helpo.“

„Mi ne bezonas helpon!“

„Vi ja estas multe pli fiere, ol mi pensis. Kiu rifuzas helpon, per kiu li povas savi sian vivon?”

„Tiu, kiu ne bezonas tiun helpon, ĉar li kapablas savi sin mem.“

„Vi insistas pri via fiero, kiu pli ŝate pereas ol li devus ŝuldi dankon al iu. Sed Sus-homaŝa ne postulas dankon. Li volas vidi vin esti libere. Vi scias, ke ‚Malhela Haro‘ estas mia filino, ĉu?”

„Jes.“

„Ŝi sentas egan kompaton pri vi.“

„Do Old Shatterhand certe estas bedaŭrinda kaj priplendinda homo, sed ne brava militisto. Kompato ja estas ofendo!”

Mi intence uzis tiun krudan esprimon, pro deigi lin de sia plano, sed ankaŭ tion mi ne sukcesis. Li milde asertis:

„Sus-homaŝa ne volis ofendi vin. Jam antaŭ Kaĥo-oto ekvidis vin, ŝi aŭdis multon pri vi. Ŝi scias, ke Old Shatterhand estas la plej eminenta blanka militisto, kaj ŝate volas savi vin.“

„Tio montras, ke ‚Malhela Haro‘ havas bonan koron. Sed ke ŝi savas min, estas fakte neeblaĵo.“

„Ne estas neeblaĵo, sed eĉ tre facile. Vi konas ĉiujn morojn de la ruĝaj viroj, sed tiu ŝajnas esti al vi nekonata. Vi utiligos tiun moraĵon, ĉar vi diris al ‚Malhela Haro‘, ke ŝi plaĉas al vi.“

„Tio estas eraro. Mi diris tion ne al ŝi.“

„Sed tamen ŝi konfesis tion al mi. Kaj mia filino neniam estis dirinta la malveron al mi.“

„Tiukaze okazis erara interŝanĝo. ‚Malhela Haro‘ portis manĝaĵojn al mi. Tiam la gardisto demandis min, ĉu ŝi plaĉas al mi, kaj mi jesis. Tiel ĝi estis.“

„Estas la samo. Ĉiukaze ŝi plaĉas al vi. Ĉu vi scias, ke tiu apartenas al la tribo aŭ povas esti enprenata en la tribon, kiu estigas unu el ĝiaj filinoj sian *squan*?”

„Jes.“

„Eĉ, se li estis antaŭe malamiko aŭ eĉ kaptito de la tribo, ĉu?”

„Mi scias.“

„Kaj ke li tiukaze estas senkulpigata kaj liberigata, ĉu?”

„Ankaŭ tion mi scias.“

„Uŝ! Do vi certe komprenas min.“

„Jes, mi komprenas vin.“

„Malhela Haro‘ plaĉas al vi, kaj vi plaĉas al ŝi. Ĉu vi volas havi ŝin kiel via *squan*?”

„Ne.“

Ekestis profunda, inkuba silento. Tion li ne estis ekspektinta. Mi estis dediĉita al la ekmorto, kaj ŝi estis unu el la plej avidindaj knabinoj, la filino de unu el la plej dignaj militistoj de la tribo, kaj tamen mi malakceptis ŝin! Ĉu tio eblis? — Fine li demandis koncize kaj malĝentile:

„Kial ne?”

Ĉu mi povis diri al li miajn veraĵn kaŭzojn? Ke instruita eŭropano ne povas fordoni sian tutan estonton per edziĝi al ruĝa knabino? Ke tia edzeco al indianino ne povas

oferti al tia viro tion, kion ĝi ofertu al li? Ke Old Shatterhand ne apartenis al tiuj fiuloj, kiuj prenas ruĝan *squaw*:on, nur pro forlasi ŝin poste, kiuj eĉ ofte havas alian edzinon je ĉiu tribo? Tiuj kaj multaj aliaj kaŭzoj, kiuj ne estus ĝustinta en lian komprenkapablon, ĉu mi diru ilin al li? Ne. Mi devis prezenti kaŭzon, kiun li komprenis kaj akceptis, kaj tial mi respondis al li:

„Mia ruĝa frato deklaris, ke li pensas, ke Old Shatterhand estas eminenta militisto. Sed tio ŝajne ne veras.“

„Veras.“

„Kaj tamen mi prenu mian vivon el la mano de virino? Ĉu Sus-homaŝa farus tion?“

„Uf!“ li vokis mirigite. Tiam li silentis. Tiu kaŭzo ŝajnis kompreneble al li, almenaŭ sufiĉe. Post mallonga tempo li demandis min:

„Kion Old Shatterhand pensas pri Sus-homaŝa?“

„Ke li estas eminenta, brava kaj sperta militisto, pri kiu lia tribo povas konfidi dum batalo kaj dum la interkonsilado.“

„Ĉu vi volus esti mia amiko?“

„Plezure!“

„Kaj kion vi diras pri Kaĥo-oto, kiu estas mia plej juna filino?“

„Ŝi estas la plej aminda kaj plej bela floro inter la filinoj de la kajovajoj.“

„Ĉu ŝi indas al viro?“

„Ĉiu militisto, al kiu vi permesos akcepti ŝin kiel *squaw*:on, povas esti fiere pri tio.“

„Vi do ne malakceptas ŝin, ĉar vi malestimas min aŭ ŝin?“

„Tio nepenseblas al mi! Sed Old Shatterhand povas defendi sian vivon, povas batali pro ĝi, sed preni ĝin el la mano de virino, tion li ne povas.“

„Uf, uf!“ li kapskuis.

„Ĉu Old Shatterhand faru ion, pri kio ĉiu, kiu aŭdas ĝin rakontota ĉe resteja fajro, sentu malestimon?“

„Ne.“

„Ĉu oni diru pri Old Shatterhand: li fiforkuris antaŭ la morto kaj en la brakumon de bela, juna *squaw*?“

„Ne.“

„Ĉu ne estas devo al mi, teni mian honoron, eĉ kiam mi devas lasi neigi mian vivon?“

„Jes.“

„Vi do komprenos, ke mi devas malakcepti vian ofertan. Sed mi dankas al vi, kaj mi ankaŭ dankas al ‚Malhela Haro‘, via bela filino. Mi volus, ke mi povus esti danka al vi en alia maniero kiel nur per vortoj.“

„Uf, uf, uf! Old Shatterhand estas vera viro! Priplendindas, ke li devas ekmorti. Kion mi ofertis al li, estis la sola rimedo savi lin. Sed mi komprenas, ke brava militisto ne povas akcepti ĝin. Kiam mi diros tion al mia filino, ŝi ankaŭ ne ĉagreniĝos pri li.“

„Jes, diru tion al ŝi! Mi treege bedaŭrus, kiam ŝi pensus, ke mi estus malakceptinta vian ofertan nur pro ŝi.“

„Ŝi nun amos kaj honorigos vin des plie ol antaŭe, kaj kiam vi staros sur la torturofosto kaj ĉiuj aliaj ĉeestos pro vidi viajn turmentojn, ŝi sidos en la plej profunda kaj

malhela angulo de sia tendo kaj kovros ŝian vizaĝon per la manoj. *Howgh!*“

Post tiu emfaziga vorto li stariĝis kaj foriris, sen denove paroli pri tio, ke li volis gardadi min. Kiam li forestis, la gardistoj resurposteniĝis.

Dank’ al Dio, tio estis feliĉe sukcesinta! Tio estis klifo, per kiu mia espero pri savo facile estus povinta ŝipperei, ĉar se mi estus estiĝinta ‚Unu Plumon‘ mian malamikon kaj estus prokovinta lian vengemon, lia gardado estus estinta pli danĝera al mi ol ĉia alia malhelpaĵo.

Baldaŭ poste Pida aperis, kaj mi devis kuŝiĝi. Kun vaste elstreĉitaj brakoj kaj kruroj mi estis ligata al kvar fostoĵ, sed mi ricevis kunvolvitan kovrotukon kiel kapkuseno, kaj estis kovrata per dua.

Apenaŭ ke Pida forestis, anonciĝis alia vizitanto, pri kiu mi ĝojis: estis mia nigra virĉevalo, kiu estis paŝtiĝinta en la proksimo sen kuniĝi al la aliaj ĉevaloj, kaj kuŝiĝis, post ĝi estis karesante flaruminta min, kuŝiĝis malproksime de mi. La gardistoj ne malebligis tion. La ĉevalo ja ne povis malligi kaj forporti min.

Tiu fideleco de la ĉevalo nun havis la plej altan valoron al mi. Se mi iam povus fuĝi, tio verŝajne estus dumnokte, kaj se mia ĉevalo ĉiam agis kiel hodiaŭ, ke ĝi venis al mi, mi ne devis uzi alian, al mi nekonatan, aŭ fari la malfacilan, temporabantan kaj danĝeran klopodon serĉi ĝin.

Okaziĝis, kiel mi estis supozita: mi ne povis dormi. La elstreĉitaj brakoj kaj kruroj komencis dolori kaj sensentiĝis. Kiam mi ekdormetis, mi tre baldaŭ revekiĝis, kaj estis vera savo, kiam la mateno komencis, kaj mi estis ligata denove starante al la arbo.

Se tio daŭriĝus ankoraŭ multajn noktojn plu, mi devis korpe malfortiĝi malgraŭ la bona nutriĝo. Sed mi ne povis diri ion kontraŭ tio, ĉar plendi pri sendormeco estus estinta malhonorigo al Old Shatterhand.

Mi scivolemis, kiu hodiaŭ alportus mian matenmanĝon. Ĉu ‚Malhela Haro‘? Certe ne, ĉar mi estis malakceptinta la oferton de ŝia patro. Sed ŝi venis tamen. Ŝi ne diris unu vorton, nur en ŝiaj okuloj mi rimarkis, ke ŝi ja ne ĉagreniĝis pri mi, sed malgajis.

Kiam Pida aperis pro vidi al mi, mi eksciis, ke li volis elrajdi pro ĉasadi kun trupo de siaj militistoj, kaj revenos nur je la posttagmezo. Mallongan tempon poste mi vidis, kiel ili elgalopis sur la prerion.

Kelkaj horoj pasis, tiam Santer ekaperis inter la arboj. Li kondukis sian selitan ĉevalon per la mano, estis surŝultriginta sian pafilon kaj venis rekte al mi.

„Mi ankaŭ volas elrajdi pro ĉasado, kaj sentas ĝin esti mia ŝuldumo anonci tion al Vi, *Mr. Shatterhand*“, li komencis. „Verŝajne mi renkontos Pida:n tie ekstere, kiu havas tian bonvolon pri Vi, kaj tian malsimpation pri mi.“

Li ŝajne ekspektis respondon, sed mi agis, kvazaŭ mi estus nek aŭdinta nek vidinta lin.

„Vi do surdiĝis, ĉu, ha?“

Denove neniu respondo.

„Tion mi bedaŭras, ne nur pro Vi, sed ankaŭ pro mi!“

„For, fiulo!“ mi kolerumis al li.

„Ho, Vi do povas paroli, sed ne aŭdi, ĉu? Domaĝe, ege domaĝe! Mi volis fari kelkajn demandojn al Vi.“

Li impertinente vidis en mian vizaĝon. Lia vido dum tio havis strangan, mi volas diri, diablece triumfantan esprimon. Li forsilentis ion de mi, tio certis.

„Jes, mi volis fari kelkajn demandojn al Vi“, li ripetis. „Vi ĝojus, se Vi aŭdus ĝin, *Mr. Shatterhand*.“

Santer vidis al mi ekspektoplene, ĉu mi diris ion. Kiam tio ne okazis, li ridis:

„Hahahaha, kia sceno estos tiu! La fama Old Shatterhand je la arbo de la morto, kaj la fiulo Santer libera viro! Sed estiĝos eĉ multe pli bone, *Sir*. Ĉu Vi eble konas arbaron, hm, jes, tiuspecan abiaro aŭ Indeltŝe-tŝil?“

Tiu vorto preskaŭ ĉesigis mian spiron. Ĝi ja estis menciita en la testamento de Winnetou. Mi sentis, ke mia vido volis trabori lin.

„Ha, jen li vidas al mi, kvazaŭ li havus ponardojn en la kapo anstataŭ okuloj!“ li ridis. „Jes, jes, laŭdire ekzistas tiaj arbaroj, laŭ kio mi aŭdis!“

„Fiulo, de kie Vi havas tion?“ mi grumblis.

„De tie, de kie mi ankaŭ havas la Tse-ŝos:on. Ĉu Vi eble konas tiun?“

„*By Jove*, mi estos —“

„Nur atendu, atendu!“ li interrompis min. „Kia stranga aĵo nu estas tio, Deklil-to, aŭ kiu estis la nomo? Mi volas —“

„Fiulo!“ mi vokis, ne, kriis, ne, kriegis. „Vi havas la paperojn, kiujn mi —“

„Jes, tiujn mi havas!“ li interrompis miajn vortojn per moke triumfanta ridado.

„Vi ŝtelis ilin de Pida!“

„Sensencaĵo! Mi nur prenis, kio estas mia posedaĵo. Ĉu oni nomas tion ŝteli? Mi havas la paperojn, mi havas ilin kune kun ĉio, kiu estas ĉirkaŭ kaj kun ili.“

„Tenu lin! Fikstenu lin!“ mi kriis kolerege al miaj gardistoj.

„Ĉu teni min?“ li ridis, rapide surĉevaliĝinte. „Provu tion!“

„Ne lasu lin foriri!“ mi vokegis. „Li ŝtelis de Pida! Santer ne povu foriĝi — —“

Miaj vortoj sufokiĝis per la peno disŝiri min de la arbo. Santer galope forrajdis, kaj la gardistoj ja estis salte stariĝintaj, sed faris nenion krom senkomprene fiksrigardi post li. La testamento de Winnetou! La lasta volo de mia ruĝa frato estis rabita! Tie ekstere la ŝtelinto jam rapidrajdis sur la ebenaĵo, kaj neniu homo ekfaris moviĝon sekvi lin!

Mi estis furioze kaj tiris, tiris per ĉiu forto je la rimenoj, kiuj fiksigitis miajn manojn sur la arbo. Mi ne pripensis, ke li estis preskaŭ nedisŝirebla, kaj ke mi ne povis foriri, eĉ se ĝi estus disŝirinta, ĉar miaj piedoj ja ankaŭ estis fiksligitaj. Mi eĉ ne sentis la dolorojn en la manartikoj. Mi tiris kaj vokegis — — tiam mi subite falis antaŭen sur la teron. La rimeno estis diskreviĝinta.

„*Uf, uf!*“ la gardistoj vokis. „Old Shatterhand liberiĝis!“

Ili ekprenis pro teni min.

„Lasu min, lasu min!“ mi vokegis. Mi ja ne volas fuĝi, mi nur volas ekkuri pri sekvi kaj kapti Santer:on! Li ŝtelis de Pida!“

Mia vokado estis atentiginta la tutan vilaĝon. Ĉiu haste alkuris pro maldanĝerigi min. Tio estis rilatece facile, ĉar miaj piedoj ankoraŭ estis ligitaj al la fostoj, kaj cent manoj estis etendigitaj al mi. Sed ĉio ne okazis sen batoj kaj puŝoj de mia, kaj grataĵoj kaj ŝvelaĵoj je ilia flanko, ĝis mi denove pendis fikse kun la manoj al la fosto.

La ruĝuloj frotis iliajn ejojn, kie mi estis trafinta ilin, sed ŝajne tute ne troe ĉagreniĝis pri mi pro tio, sed nur esprimis ilian miron, ke mi diskrevigis la rimenon.

„Uf, uf, uf — liberiĝinta — neniŭ homo povus kredi tion!“

Tiaj kaj similaj admiraj vokoĵ laŭtiĝis, kaj nur nun mi sentis la dolorojn en mia man-artikoj. Ili sangis, ĉar la rimeno estis distrancinta mian karnon ĝis la ostoj, antaŭ ke ĝi disŝiriĝis.

„Kial vi staras tie ĉi kaj rigardaĉas min!“ mi koleriĝis al la ruĝuloj. „Ĉu vi ne jam komprenis, kion mi diris? Santer ŝtelis de Pida! Rapide sur la ĉevalojn! Revenigu Santer:on!“

Sed neniŭ obeis. Mi furiozis kaj vokegis ankoraŭ plu, ĝis finfine venis iu, kiu pli komprenemis ol la aliaj, fakte ‚Unu Plumo‘. Li dispuŝis la rigardaĉantojn, paŝis al mi kaj demandis, kio estis okazinta. Mi diris ĝin al li.

„Do la parolanta papero nun estas la posedaĵo de Pida, ĉu?“ li nenecese volis scii.

„Certe, certe! Vi ja ankaŭ ĉesidis, kiam ĝi estis donata al li!“

„Kaj vi scias ekzakte, ke Santer fuĝis kun ĝi kaj ne volas reveni, ĉu?“

„Sed jes, jes!“

„Do ni unue demandu Tangua:n, kio devas esti farata, ĉar li estas la plej altranga ĉefo.“

„Demandu lin pro mi, demandu! Nur ne hezitu, sed rapidiĝu, rapide, rapide!“

Sed ‚Unu Pulmo‘ atendis kelkan tempon plu, ĉar li vidis la rimenon, kiun mi estis disŝirinta sur la tero, kliniĝis, rigardis ĝin, skuis la kapon kaj demandis la plej proksime starantan ruĝulon:

„Ĉu tiu ĉi estas la rimeno, kiun li diskrevigis?“

„Jes.“

„Uf, uf! Jes, li estas Shatterhand! Kaj tiu viro devas ekmorti! Kial li ne estas ruĝa militisto, ne kajovajo, sed palvizaĝo?“

Nur nun li foriris kaj kunprenis la rimenon. La aliaj, escepte de miaj gardistoj, sekvis lin.

Mi atendis scivolege, per konsumiĝa malpacienco, kiam la persekutado de la ŝtelisto komencus. Neniŭ okaziĝo pro tio! Post mallonga tempo la trankvila vilaĝa vivo rekomencis en ĝia antaŭa maniero. Tio povis furiozigi min. Mi petis al miaj gardistoj ek-koniĝi. Ili ne rajtis foriri. Ili alvokis alian. Per li mi eksciis, ke Tangua estis malpermesinta la persekutadon. La parolanta papero ne estis gravaĵo, ĉar Pida ja ne povis legi kaj utiligi ĝin.

Oni facile povas imagi mian eksciton, mian ĉagrenon, mian koleron. Mi grincis per la dentoj, ke miaj gardistoj zorgoplene vidis supren al mi, kaj mi plene pretiĝis deŝiri min denove, malgraŭ la doloroj, kiujn tio kaŭzis. Mi fakte ĝemis per ĉagreno. Sed kiel tio povis utili aŭ helpi al mi? Neniŭ, tute neniŭ! Mi devis akcepti tion. Tion mi finfine komprenis, kaj malgraŭ ĉio deviĝis al ekstera trankvileco.

Tiel pasiĝis certe tri horoj, kiam mi aŭdis inan voĉon laŭte voki. Mi antaŭe ja estis vidinta, sed ne aparte priatentiĝinta, ke ‚Malhela Haro‘ estis paŝinta el sia tendo kaj foririnta. Nun ŝi revenis haste kurante kaj laŭte kriante, malaperis en la eniro kaj poste

reaperis kun sia patro, kiu, same laŭte vokante, forkuris kun ŝi. Ĉiuj, kiuj troviĝis en la proksimo, kuris post ili. Certe io grava estis okaziginta! Eble ĝi rilatis al la ŝtelado de la paperoj!

Ne daŭris longe, kiam ,Unu Pulmo‘ rekte venis kurante al la loko, kie mi staris fiksligite al la arbo, kaj vokis jam de longa distanco:

„Old Shatterhand kapablas ĉion. Ĉu li ankaŭ estas kuracisto?“

„Jes“, mi asertis kun la espero esti kondukata al malsanulo, ĉar tiukaze oni devis malligi min.

„Ĉu vi do povas kuraci malsanulojn?“

„Jes.“

„Sed ja ne vekis mortulojn, ĉu?“

„Ĉu iu mortas?“

„Jes, mia filino.“

„Ĉu via filino? Ĉu ,Malhela Haro‘?“ mi demandis ektimigite.

„Ne, sed ŝia fratino, la *squaw* de la juna ĉefo Pida. Ŝi kuŝis katenite sur la tero kaj ne moviĝis. La medicinisto ekzamenis ŝin kaj diris, ke ŝi ekmortis, mortbatita de Santer, la rabinto de la parolanta papero. Ĉu Old Shatterhand volas redoni la vivon al ŝi?“

„Konduku min al ŝi!“

Tuj mi estis malligata. Tiam oni kunligis miajn manojn kaj tiel katenis miajn piedojn, ke mi ja povis paŝi, sed ne forkuri. En tiu maniero mi estis kondukata tra la vilaĝo al la tendo de Pida. Ke mi nun ekkonis tiun tendon kaj ĝian situon estis tre kare al mi, ĉar en ĝi troviĝis miaj du pafiloj. La ejo estis plenigita de ruĝaj viroj, virinoj kaj infanoj, kiuj respektplene formigis strateton, tiel ke mi povis trairi.

Mi paŝis kun ,Unu Plumo‘ en la tendon, kie ,Malhela Haro‘ kaj maljuna malbela ulo kaŭris flanke de la sur la tero kuŝanta ŝajna mortulino. Tiu maljunulo estis la medicinisto. Ambaŭ stariĝis, kiam ili vidis min enpaŝi. Neevidentiĝe mi rigardis la tutan ĉambron. Ha, tiel dekstre estis mia selo kun la kovrilo, de unu el la du tendopalisetoj pendis miaj revolveroj kaj supre de tiu estis la *bonnie*-tranĉilo pikita en la palisan lignon! La posedanto de la tendo do ankaŭ transprenis tiujn aĵojn kiel siaj posedaĵoj. Facile penseblas, kiel mi ĝojis pri tio.

„Old Shatterhand vidu al la mortulino, ĉu li povas revivigi ŝin!“ ,Unu Pulmo‘ petis min.

Tuj mi surgenuiĝis kaj ekzamenis la virinon per la katenitaj manoj. Nur post pli longa tempo mi rimarkis, ke ŝia sango ankoraŭ moviĝis. Ŝia patro kaj ŝia fratino tenadis iliajn okulojn direktigite al mi per timplena scivolego.

„Ŝi mortas, kaj neniu homo povas vekis mortulojn“, asertis la medicinisto, kiu ne estis rimarkinta la malfortajn vivospurojn en la korpo de la senkonsciigito.

„Old Shatterhand povas“, mi deklaris.

„Vi povas, ĉu vi?“ ,Unu Pulmo‘ demandis rapide kaj ĝoje.

„Veku ŝin, ho veku ŝin!“ ,Malhela Haro‘ petis min, metante ambaŭ ŝiajn manojn sur mian ŝultron.

„Jes, mi povas fari ĝin, kaj mi faros ĝin“, mi ripetis, „sed se la vivo revenu, neniu homo escepte de mi estu ĉe la mortulino.“

„Ni do eliru, ĉu?“ demandis la patro.

„Jes.“

„Uŝ! Ĉu vi scias, kion vi postulas?“

„Kion?“ mi demandis, kvankam mi sciis ĝin tute bone.

„Tie ĉi estas viaj armiloj. Se vi atingos ilin, vi liberos. Ĉu vi promesas al mi ne tuŝi ilin?“

Facile pensebla, kiel malfacile la respondo estis al mi. Per la tranĉilo mi povis deigi miajn katenojn. Kiam mi tiam havis la revolveron kaj la pafilon, tiukaze mi ŝate estus vidinta la ulon, kiu estus estinta tiel riskeme veni en mian proksimon! Sed ne! Dum tio povis okaziĝi batalo, kion mi necese volis eviti, kaj krome naŭzis al mi utiligi la senkonscion de virino pro tiu celo.

Sed mi ekhavis alian savigan penson en la sama momento. Sur pro virinaj laboradoj streĉita felo mi vidis diversajn ilojn, kudrilon, borilon kaj similajn aĵojn, inter tiuj ankaŭ du, tri malgrandajn tranĉilojn, kiel ili estas uzata de la indianinoj pro la disigo de fortaj, solidaj tendenaj juntoj. Tiuj malgrandaj, maldikaj klingoj plej ofte tre akras. Mi nur bezonis tian tranĉilon pro liberiĝi. Tial mi deklaris trankvile:

„Mi promesas tion. Vi ja povas, pro esti tute certe, kunpreni la armilojn eksteren!“

„Ne, tio ne necesas. Kion Old Shatterhand promesas, tion li ankaŭ plenumigos. Sed tio ne jam sufiĉas.“

„Kio plu?“

„Vi povus, nun ke vi estas malligita de la arbo, provi ekfuĝi ankaŭ sen viaj armiloj. Ĉu vi bonvolas promesi al mi, ne fari tion nun?“

„Jes.“

„Ĉu vi promesas reveni al la arbo de la morto kaj lasi vin fiksligi?“

„Mi promesas ĝin!“

„Do kunvenu eksteren! Old Shatterhand ne estas mensogisto kiel Santer, ni povas fidi pri li.“

Kiam la ruĝuloj estis forlasintaj la tendon, estis mia unua ago, ŝovi unu el la malgrandaj tranĉiloj sub la fermbutonitan maldekstran brakumjunton de mia ĉemizo. Tiam mi okupiĝis pri la virino.

Ŝia edzo estis ĉasanta. Tion Santer estis ekuzinta pro perforte enpenetri en la tendon. Ekde tio jam kelka tempo estis pasinta, kaj ŝi ankoraŭ kuŝis tie senkonscie. Tio ne povis esti nur de ektimo kaŭzita senkonscio, sed estis narkozo kun pli profunda kaŭzo. Mi do etendis mian manon al ŝia kapo kaj sentis, ke la kranikovro estis ege ŝvelita je la loko de la malantaŭa kapo. Kiam mi premis tiun lokon, la virino elpuŝis doloran ĝemeton. Mi premis refoje kaj refoje, ĝis ŝi malfermis la okulojn kaj vidis al mi, unue fiksrigarde, sed tiam ŝi spirete diris mian nomon: „Old Shatterhand!“

„Ĉu vi rekonas min?“ mi demandis.

„Jes.“

„Memoriĝu! Ne denove senkonsciĝu, alikaze vi mortos! Kio okazis?“

Mia averto, ke ŝi ekmortus, havis bonan efikon. Ŝi klopodis, peniĝis, rektiĝis per mia helpo en sidan pozicion, kaj metis la manojn sur la dolorantan kapon.

„Mi estis sole. La blanka viro envenis kaj postulis la medicinon. Mi ne donis ĝin al li, tiam li batis min.“

„Kie estis la medicino? Ĉu ĝi forestas?“

La *squan* vidis al paliso kaj ektimigite vokis, kvankam per malforta voĉo:

„Uf! Ĝi forestas! Li kunprenis ĝin! Kiam li batis min, mi falis sur la teron. Mi ne memoras ion plu.“

Nur nun mi ekmemoris, ke Santer hodiaŭ laŭdiĝis antaŭ mi, ke li posedis la paperon kune kun ĉio, kio estis ĉirkaŭ kaj kun ili. Li do forprenis la surskribitajn foliojn kune kun la medicino, en kiu laŭ tio Pida estis lasinta ilin. De la ĉefo Pida estis ŝtelita la medicino, preskaŭ neanstataŭigebla perdo! Li devis efikigi ĉion, pro reatingi ĝin.

„Ĉu vi sufiĉe fortas resti konscie? Aŭ ĉu vi denove falos?“ mi demandis.

„Mi ne falos“, la virino deklaris. „Vi redonis la vivon al mi, mi dankas al vi!“

Mi stariĝis kaj malfermis la felpordon. La patro kaj la fratino staris en la proksimo, pli malproksime la vilaĝanoj.

„Envenu!“ mi postulis al la du. „La mortulino reviviĝis.“

Kian ĝojon tiuj vortoj efikis, mi ne bezonas diri. La patro kaj la filino, kaj poste ankaŭ ĉiuj kajovajoj estis konvinkitaj, ke mi estus farinta veran miraklon. Ne estis kaŭzo al mi kontraŭi al ili. Mi preskribis volvaĵojn kaj montris, kiel ili devis esti farataj.

Kiel grandis tiu ĝojo, tiel ankaŭ grandis la kolero pri la malapero de la medicino. La malbonega okaziĝo estis anoncata al Tangua, kiu nun finfine sendis militistaron post la rabisto, kaj ankaŭ elrajdiĝis kelkajn mesaĝistojn, kiuj serĉu Pida:n. Mi estis rekondukata de ‚Unu Plumo‘ al la arbo de la morto, kaj fiksligata tie. Li plenis je laŭdo pri mi, kaj elverŝis sian dankemo sur min, sed certe nur en indiana maniero.

„Ni pretigos por vi eĉ pli egan tormentadon sur la torturofosto ol ni estis planintaj“, li asertis al mi. „Neniam antaŭe iu homo estu suferonta kiel vi, pro ke vi estos en la Ĉiamaj Ĉasejoj la plej eminenta kaj grava inter ĉiuj palvizaĝoj, kiuj ricevos la permeson ekloĝi tie.“

Dankon! mi pensis, sed mi diris laŭte:

„Se vi tuj estus persekutinta Santer:on, kiel mi postulis, li estus jam nun sub via forto. Sed nun li verŝajne sukcesos fuĝi!“

„Ni kaptos lin. Lia spuro klare videblas.“

„Jes, se mi povis esti sekvanta lin!“

„Vi ja povas!“

„Ĉu mi? Mi ja estas kaptita kaj katenita!“

„Ni lasos vin forrajdi kun Pida, se vi promesos reveni kun li pro lasi vin torturadi. Diru, ĉu vi volas fari tion!“

„Ne. Se mi ekmortu, tiukaze laŭeble baldaŭ. Mi preskaŭ ne povas atendi tion.“

„Jes, vi estas heroo, tion mi scias, kaj tion mi nun ekscias denove, ĉar nur heroo povas diri tiajn vortojn. Ni ĉiuj bedaŭras, ke vi ne estas kajovajo!“

Li foriris, kaj mi estis tiel indulge ne diri al li, ke lia plendo ne eĥis en mia koro. Mi eĉ havis la intencon forlasi ĉiujn miajn admirantojn jam dum la sekvinta nokto, fakte sen ia adiaŭo.

Pida estis trovita rapide, kaj alvenis galope sur ŝvitmalseka ĉevalo en la vilaĝon. Lia unua vizito kondukis lin en sian tendon, la neksta al sia patro, kaj tiam li aperis ĉe mi. Ekstere li ŝajniĝis trankvile, sed certe ege klopodis kaŝi sian eskciton.

„Old Shatterhand revekis mian *squaw*:on, kiun mi amas, el la morto kaj revivigis ŝin“, li komencis. „Mi dankas al li. Ĉu li scias ĉion, kio okaziĝis?“

„Jes. Kiel fartas la *squaw*?“

„Ŝia kapo doloras, sed la akvo bonfartigas ŝin. Ŝi baldaŭ reestos sane. Sed mia animo malsanas, kaj ne povos esti resanigite, antaŭ mi rehavas mian medicinon.“

„Kial vi ne lasis vin averti!“

„Old Shatterhand ĉiam pravas. Se niaj militistoj estus almenaŭ obeinta al li hodiaŭ, kaj tuj estus rajdintaj post la ŝtelisto, Santer certe jam nun reestus tie ĉi.“

„Ĉu Pida komencos la persekutadon?“

„Jes. Mi hastu, kaj nur venis al vi pro adiaŭi. Nun via ekmorto denove estas prokrastata, kvankam vi volas ekmorti rapide, kiel ‚Unu Plumo‘ diris al mi. Vi atendu, ĝis mi revenos.“

„Ŝate.“

Tio estis eldirita vere sincere, sed li komprenis ĝin laŭ sia propra scio kaj konsolis min.

„Ne estas bone havi la morton tiel longe antaŭ la okuloj, sed mi ordonis, ke tiu tempo estos malfaciligata laŭeble al vi. Sed ĝi estos eĉ pli malfacile al vi, se vi bonvolas fari tion, kion mi nun proponos al vi.“

„Kio estos tio?“

„Ĉu vi volas rajdi kun Pida?“

„Jes.“

„Uŝ! Tio bonas, ĉar tiukaze ni tutcerte kaptos la ŝtelinton. Ni tuj malligos vin kaj redonos viajn armilojn al vi.“

„Ĉesu, ne jam! Mi prezentos miajn kondiĉojn.“

„Kiajn kondiĉojn?“

„Ke mi kunrajdos kiel libera viro.“

„Uŝ! Tio neblas.“

„Tiukaze mi restos tie ĉi.“

„Vi ja estas libere, dum ni forestos, sed poste vi revenu kun ni, kaj denove estu nia kaptito. Ni postulas nenion de vi, nur ke vi promesas al ni ne forfuĝi de ni survoje.“

„Vi do kunprenos min nur, ĉar neniuj spuroj restas nerimarkata de mi? Mi restos tie ĉi. Old Shatterhand ne lasas sin uzi kiel ĉashundo.“

„Ĉu vi ne volas ŝanĝi vian opinion?“

„Ne.“

„Pripensu bone! Tiukaze estus eble, ke ni ne ekkaptos la ŝtelinton de mia medicina.“

„Tio malbonus por vi. Li tutcerte ne povus forfuĝi de mi, se mi volus havi lin. Sed ajn ĉiu iru kaj haviĝu mem kion estis ŝtelita de li.“

Sen kompreni min, li sensesperigite skuis la kapon kaj asertis al mi:

„Pida ŝate estus kunpreninta vin, pro danki al vi, ke vi revivigis lian *squaw*:on. Li ne kulpas, ke vi ne volas.“

„Se vi vere volas danki al mi, vi povas plenumigi deziron de mi.“

„Eldiru ĝin!“

„Mi nu pripensas pri la tri palvizaĝoj, kiuj venis kun Santer. Kie ili troviĝas nun?“

„Nun ankoraŭ en ilia tendo.“

„Ĉu libere?“

„Ne. Ili estas katenitaj. Ili estis la amikoj de la ŝtelinto de la medicino de Pida.“

„Sed ili senkulpas.“

„Tion ili diras, sed Santer nun estas nia malamiko, kaj la amikoj de mia malamiko estas miaj malamikoj. Ili estos ligataj al la arbo de la morto, pro ekmorti kun vi.“

„Kaj mi asertas, ke ili sciis tute nenion pri la ago de Santer!“

„Tio ne estas nia afero. Se ili estus aginta laŭ via propono! Pida scias, ke vi avertis ilin.“

„Pida, la juna, brava kaj nobla ĉefo de la kajovajoj aŭskultu, kion mi diras al li: mi devas ekmorti torturadite, kaj ne petis pro mi, sed pro ili mi petas.“

„Uŝ! Kia estas via peto?“

„Liberigu la tri palvizaĝojn!“

„Ĉu Pida permesu, ke ili foriras, kun iliaj ĉevaloj kaj iliaj armiloj? Kiel li povus fari tion?“

„Liberigi ilin, pro via *squam*, kiun vi amas, kiel vi deklaris al mi!“

Li deturniĝis de mi. Estis interna interbatalo en li kelkan tempon, tiam li returniĝis al mi kaj diris:

„Old Shatterhand ne estas kiel aliaj palvizaĝoj, tute ne kiel aliaj homoj. Oni ne povas kompreni lin. Se li estus petinta pro si mem, ni eble estus estinta prete lasi ŝancon al li eviti la ekmorton. Estus estinta permesata al li batali kun niaj plej bravaj kaj plej fortaj militistoj pri lia vivo. Sed li ne volas ricevi donacojn kaj petas pro aliaj.“

„Tion mi faras, mi eĉ ripetas mian peton.“

„Nu bone, ili estu liberaj, sed tiukaze mi ankaŭ havas kondiĉon.“

„Eldiru ĝin.“

„Al vi mem nun estas nenio, tute nenio donacata! Pro la savo de mia edzino vi ne postulu dankon plu. Ni estas kvitaj.“

„Bone! Ni estas kvitaj!“ mi kosentis.

„Do mi nun liberigu la tri. Sed ili estu hontigataj. Ili ne kredis al vi, kaj ne volis aŭdi viajn konsilojn, nun ili venu pro danki al vi. *Hongh!*“

Post tio li turniĝis, kaj mi vidis lin iri en la tendon de sia patro, kiu ja devis scii, kion la filo promesis al mi. Mallongan tempon poste Pida reelpaŝis kaj malaperis sub la arboj. Kiam li revenis, la tri blankuloj sekvis lin sur iliaj ĉevaloj. Li ordonis al ili iri al mi, sed mem ne kunvenis.

Gates, Clay kaj Summer alrajdis per veraj bedaŭrigaj pekulecaj mienoj.

„Mr. Shatterhand“, la unua komencis, „ni aŭdis, kio okaziĝis. Ĉu do vere estas tia teruraĵo, se foje tia maljuna medicinsaketo perdiĝis?“

„Tiu demando certigas mian opinion, ke Vi fakte scias tute nenion pri la Sovaĝa

Okcidento. Perdi la medicinon, tio estas la plej terura aĵo, kiu povas okazi al indiana militisto. Vi ja devus scii tion.“

„*Well!* Do tial Pida estis tiel kolere, kaj tial ni estis katenitaj. Nun Santer ege malbonfartos, se ili kaptos lin.“

„Tion li ankaŭ meritis. Ĉu Vi nun komprenas, ke li volis nur trompi Vin?“

„Ĉu nin? Ĉu la medicino iel estas nia afero, kun kiu li malaperis?“

„Ho, ege jes! Ĉar en la medicinsako troviĝas la paperoj, kiujn li volis havi tiel ŝate.“

„Kaj kiel la paperoj rilatas al ni?“

„Ili enhavas ekzaktan priskribon de la loko, kie la *nugget*-oj estis kaŝitaj.“

„*Hang it all!*“ Ĉu tio veras?“

„Certe!“

„Tiukaze Vi ja ankaŭ konas la lokon! Diru ĝin al ni, *Mr. Shatterhand!* Ni rajdos post la fiulo kaj forprenos la oron de antaŭ lia nazo!“

„Pro tio Vi unue ne estas la ĝustaj uloj, kaj due Vi ne estis kredinta al mi ĝis nun, kaj ankaŭ nun ne bezonas kredi al mi. Santer estis kunpreninta Vin nur kiel ĉashundoj, kiuj devis helpi al li ek trovi la orajn vulpojn. Poste li estus terenpafinta Vin. Nun li ne plu bezonas Vin, kaj ankaŭ ne necesis al li plu silentigi Vin, ĉar dum lia fuĝo li povis ekspekti, ke la ruĝuloj pensus Vin esti liaj kunagintoj kaj traktus Vin tiel.“

„*Zounds!* Do ni ŝuldas niajn vivojn nur al Vi, ĉu? Pida diris tion.“

„Boneble estas tiel. Estis decidita, ke Vi ekmortu kun mi sur la torturofosto.“

„Kaj Vi petis, ke ni estu liberigataj, ĉu? Ĉu ne ankaŭ pro Vi? Diru, kio nun okazos al Vi?“

„Mi estos torturata, nenio plu.“

„Ĉu ĝismorte?“

„Jes.“

„Tion ni ege bedaŭras, *Sir!* Ĉu ni ne povas helpi al Vi iamaniere?“

„Dankon, *Mr. Gates!* Ĉio helpo pro mi vanas. Nur trankvile forrajdu, kaj kiam Vi renkontos homojn, Vi povas rakonti, ke Old Shatterhand ne vivas plu, sed finigis sian vivon ĉe la kajovajoj sur la torturofosto.“

„Diablece malgajiga mesaĝo! Mi volus, ke mi povus rakonti pli bonajn aĵojn pri Vi!“

„Tio estus la kazo, se Vi ne estus mensoginta al mi en la Mugwort Hills. Vi kulpas pri mia kaptiteco kaj pri mia ekmorto, kiu estos kruele kaj malbele. Tiun riproĉon mi faras al Vi kaj mi deziras al Vi, ke tio ekvekos Vin meze en la dormo. Kaj nun foriĝu!“

Per embaraso li ne sciis, kion li devis respondi. Clay kaj Summer, kiuj estis dirinta ĝis nun tute neniun vorton, sciis tion des malpli, do ili pensis, ke estus la plej bona ago silente foriĝi. Fakte neni el ili estis dankinta, sed ili faris al mi rekompencan per tio, ke ili refoje reenvidis al mi kun bedaŭrajn mienojn, kiam ili estis pasinta mallongan distancon.

Ili ne jam estis malaperinta malantaŭ la horizonto, kiam ankaŭ Pida ekrajdis, sed sen foje revidi al mi; eĉ per plena rajto, ĉar ni ja estis kvitaj. Li pensis, ke li estus trovonta min je sia reveno tie ĉi ankoraŭ en katenoj, kaj mi estis konvinkita, se li ĉiam plu rajdus laŭ la spuro de Santer, ke mi rerenkontos lin aŭ ĉe la Rio Pecos aŭ sude de la Rio Gila en la Sierra Rita. Kiu pravos, ĉu li aŭ mi?

Kiam „Malhela Haro“ alportis mian tagmanĝon je la tagmezo, kaj mi demandis pri la farto de ŝia fratino, mi aŭdis, ke la doloroj ĉesis preskaŭ tute. La bona knabino donis tiom da viando al mi, ke mi ne povis finmanĝi ĝin, kaj antaŭ ŝi foriris, ŝi vidis al mi per humidaj okuloj. Mi vidis, ke ŝi ege volis diri ion, sed timevitis eldiri ĝin sen postulo. Tial mi kuraĝigis ŝin:

„Mia juna fratino volas sciigi ion al mi. Mi volas scii tion.“

„Old Shatterhand faris malĝustajon“, ŝi komencis per videbla timemo.

„Kian?“

„Ke li ne rajdis kun Pida.“

„Mi ne havis kaŭzon pro tio.“

„La eminenta blanka ĉasisto certe estis havinta kaŭzon. Estas honore ekmorti sur la fosto sen dolorsono, sed „Malhela Haro“ pensas, ke vivi en honoro estas pli bone.“

„Certe. Sed mi ja devis reveni en la kaptitecon, pro tamen ekmorti.“

„Tion Pida devis postuli, sed certe estus okaziĝinta alie. Eble li estus permesinta survoje al Old Shatterhand, esti lia amiko kaj frato, kaj fumi la pipon de la paco kun li.“

„Kaj amikon kaj fraton, kun kiu oni fumis la kalumeton, tiun oni ja ne lasas ekmorti sur la torturofosto. Tio estas, kion vi pensas, ĉu ne?“

„Jes.“

„Vi pravas, sed mi havas mian propran opinion. — Vi certe volas, ke mi restos vivante, ĉu?“

„Jes“, ŝi konfesis sincere. „Vi ja redonis la vivon al mia fratino.“

„Do ne troe afliktiĝu pri mi! Old Shatterhand ĉiam scias, kion li faras.“

Ŝi pripense vidis antaŭen sur la teron, faris kaŝan vidon flanken al la gardistoj kaj senpacienca mansignon. Mi komprenis ŝin. Ŝi deziris povi paroli kun mi pri fuĝo, sed ne rajtis tion. Kiam ŝi poste relevis la palpebrojn, mi ridetante kapjesis al ŝi.

„La okulo de mia fratino estas travideblaj kaj klaraj. Old Shatterhand povas vidi tra ĝi ĝis ŝia koro. Li konas ŝiajn pensojn.“

„Ĉu li fakte konas ilin?“

„Jes, kaj ili baldaŭ plenumiĝos.“

„Estu tiel, kiel vi diris. „Malhela Haro“ tree ĝojos pri tio!“

Tiu mallonga interparolado estis malpezinta ŝian koron kaj pligrandigita ŝian kuraĝon. Dum la vespermanĝo ŝi jam kuraĝis pli. Dum tiu tempo jam brulis, kiel hieraŭ, la fajroj, alie estis malhele sub la arboj. Ĉar ŝi donis al mi la viandopecojn per la tranĉilo, ŝi staris proksime ĉe mi. Subite ŝi signifoplene paŝis sur mian piedon, pro direktigi mian atenton al ŝiaj venontaj vortoj; ŝi demandis:

„Al Old Shatterhand estas nur malmultaj pecoj plu, kaj certe li ankoraŭ ne sufiĉe satus. Ĉu li volas ricevi ion kroman? Mi alportos tion al li.“

La gardistoj ne pensis, ke tiuj vortoj estis iel suspektindaj, sed mi sciis, al kio ŝi celis. Mi devis respondi al ŝi ion, kiu ŝajne rilatis al la manĝaĵo, sed fakte celis al aĵo, kiun mi bezonis pro ebligi la mian fuĝon. Ŝi volis alporti ĝin al mi, kiel ŝi diris.

„Mia fratino tre bonas“, mi respondis, „sed mi neante dankas al ŝi. Mi satus kaj havas ĉion, kion mi bezonas. Kiel fartas la *squaw* de la juna ĉefo de la kajovajoj?“

„La doloro pli kaj pli malaperas, sed ŝi ankoraŭ surmetas malsekajn tukojn.“

„Tre bone. Ŝi bezonas flegadon. Kiu estas ĉe ŝi?“

„Mi.“

„Ĉu ankaŭ ĉi vespere?“

„Jes.“

„Ankaŭ dum la nokto iu estu ĉe ŝi.“

„Mi restos ĝis la mateno.“

Ŝia voĉo tremis, ŝi estis kompreninta min.

„Ĉu ĝis la mateno? Tiam ni revidiĝos.“

„Jes, tiam ni revidiĝos!“

Ŝi foriris. Al la gardistoj la dusenceco de nia interparolo ne evidentiĝis.

Dum mia fuĝo mi unue devis iri en la tendon de Pida, pro ekhavi miajn aĵojn tie. Post nia nuna interparolo mi estis konvinkita, ke ‚Malhela Haro‘ estis tie kaj atendis min. Tio ĝojis min, sed ankaŭ vekis pravan dubon en mi. Kiam mi prenis miajn armilojn, kaj ĉion, kio krome tieis de mi dum la ĉeesto de la du fratinoj, certe estus farontaj la plej egaj riproĉoj al ili morgaŭ frue. Pro ne perfidi min ili estis devigitaj resti trankvile, sed ankaŭ estis ilia devo, ke ili vokis pro helpo. Kiel tiu konflikto povis esti neigata? Ne alie per tio, ke la du fratinoj lasis sin kateni libervole de mi. Kiam mi poste forestis, ili povis krii tiel longe kiel ili volis, kaj kiam ili estus demandataj diri, ke mi estus subite aperinta en la tendo kaj subiginta ilin. La demando, ĉu la fratino de ‚Malhela Haro‘ ankaŭ konsentis pri tio, ne kaŭzis aflikton al mi. Ŝi ja pensis, ke mi estis ŝia vivsavinto.

Kromis nur unu penso, pri kiu mi bedaŭrinde ne povis tiel baldaŭ trankviliĝi: Ĉu mia Henry-pafilo ankoraŭ tieis? Ne, — ĉar Pida konis la valoron de tiu pafilo kaj estis kunpreninta ĝin. Jes, — ĉar Pida ne povis uzi ĝin, kaj estus, se li volis uzi la pafilon dum la persekutado de Santer, certe devinta montriĝi al si la necesan traktadon antaŭ la forrajdo. Kio nun veris, ĉu la jes aŭ la ne? Tio estis atendenda. Se li estis kunpreninta la pafilon, mi devis unue celiĝi al mia pafilo, kaj nur poste al Santer.

Nun venis la anstataŭuloj de la du gardistoj. ‚Unu Plumo‘ alkondukis ilin. Li estis serioze, sed samtempe amikece al mi, kaj malligis min mem, ĉar li kredis, ke la aliaj ne atentigus sufiĉe pri miaj ĝisostaj vundoj je miaj manartikoj. Mi kuŝiĝis inter la kvar fostenojn kaj dum tio kaŝe tiris la malgrandan tranĉileton per la dekstra mano el la maldekstra brakumo. Tiam mi etendis la maldekstran brakon, pro lasi meti la katenon ĉirkaŭ mia manartiko. Kiam tio estis okazinta, kaj la mano nun estis alligota al la fosteno, mi agis, kvazaŭ la rimeno dolorigis mian vundon, kaj per hasta movo mi tiris ĝin al la mano. Dum tio mi ŝovis la tranĉileton per la dekstra mano inter manartikon kaj rimenon, kaj preskaŭ distranĉis ĝin.

„Atentu!“ ‚Unu Plumo‘ riproĉis la ruĝulon, kiu ligis min. „Vi tuŝis lian vundon. Old Shatterhand ne estu turmentata jam nun!“

Post tio mi faligis la tranĉileton en la herbejon, sed memortenis la lokon, kie ĝi kuŝis, pro ke mi povis atingi ĝin poste per la maldekstra mano. Tiam mia maldekstra mano estis fiksligata, poste miaj piedoj. Ankaŭ mi rericevis, ĵus kiel hieraŭ, unu sub la kapon,

kaj la alia estis vastigita super min. Fine Sus-Homaŝa ankoraŭ faris la komenton:

„Hodiaŭ Old Shatterhand tutcerte ne povos fuĝi. Kun tiaj vundoj je la manartikoj li ne disŝiros rimenon.“

Post tiuj vortoj li foriris, kaj la du gardistoj sidiĝis antaŭ min sur la teron.

Ekzistas homoj, kiuj antaŭ tiel gravaj momentoj apenaŭ povas regi ilian eskciton, sed mi tiukaze ĉiam estis estinta trankvile, eĉ pli trankvile ol kutime. Pasiĝis horo kaj dua. La fajroj estingiĝis, nur tiu antaŭ la tendo de la ĉefo Tangua ankoraŭ lumis. Malvarmetiĝis, kaj miaj gardistoj igis iliajn genuojn al la korpoj. Tio sed estis malkomforta pozicio, kaj tial ili fine kuŝiĝis, kun la kapoj turnigite al mi. Nun estis la tempo. Malrapida, sed forta ekmovo, kaj la maldekstra, preskaŭ distrancita rimeno disŝiriĝis. Tiu mano liberis. Mi tiris ĝin al mi kaj serĉis la tranĉilon, kiun mi ankaŭ fakte trovis. Nun mi turnis, kio estis estinta neeble al mi antaŭe, la supran korpon sur la dekstran flankon, ŝovis la maldekstran manon sub la kovrotukon ĝis al la dekstra mano, kaj libertrancis ĝin. Ambaŭ manoj liberis! Mi sentis min esti jam savita!

Nun la piedoj! Sed kiel? Pro atingi ilin per la manoj, mi ne nur devis sidiĝi, sed eĉ ŝoviĝi la tutan vojon malsupren. Tiam mi estus troviĝinta ĵus malantaŭ la kapoj de la du indianoj. Ĉu ili tree gardemis? Mi moviĝis kelkajn fojojn, ili kuŝis trankvile. Ĉu ili dormis?

Povis esti ajn kiel ĝi estis: oni pli bone agu rapide ol nur tro tarde! Mi deŝovis la kovrotukon de mi, sidiĝis, kaj ŝoviĝis malsupren. Verece, la ruĝuloj dormis! Du rapidaj tranĉoj, kaj mi liberis. Du same rapidaj pugnobatoj sur iliajn kapojn, kaj la gardistoj estis senkonsciigitaj. Mi katenis ilin per la kvar distrancitaj rimenoj kaj deŝiris du angulojn de la tuko pro ŝovi ilin kiel ŝtopiloj en la buŝojn, pro ke ili ne povis voki post la revekiĝo. Je mia ĝojo mi vidis, ke mia ĉevalo ankaŭ ĉi nokte rekuŝis en la proksimo. Nun mi stariĝis kaj movigis la membrojn. Kiel tio bonfartigis! Kiam la brakoj estis ricevintaj ilian movkapablon, mi kuŝiĝis sur la teron kaj forrampis, de arbo al arbo, de tendo al tendo. Nenio moviĝis en la vilaĝo, kaj mi feliĉe atingis la tendon de Pida. Mi jam volis ŝovi la pordan kovrotukon flanken mallaŭte, kiam mi ekaŭdis brueton je mia maldekstra flanko. Mi aŭskultis. Singardaj paŝoj alvenis, kaj proksime antaŭ mi ekstaris virina figuro.

„Malhela Haro, ĉu?“ mi spirdiris.

„Ĉu Old Shatterhand?“ ŝi redemandis.

Mi stariĝis kaj respondis:

„Vi ne estas en la tendo. Kial?“

„Enestas tute neniu, pro ke ni morgaŭ frue ne estos riproĉataj. Mia fratino mal-sanas, kaj mi devas flegi ŝin, kaj tial portigis ŝin en la tendon de mia patro.“

Ho virina ruzeco!

„Kaj miaj armiloj ankoraŭ tieas, ĉu?“ mi demandis.

„Jes, ankoraŭ tiel, kiel dum la tago.“

„Tiam mi vidis ilin nur parte. Sed la pafiloj, ĉu?“

„Sub la lito de Pida. — Ĉu Old Shatterhand havas sian ĉevalon?“

„Ĝi atendas min. — Vi estis tiel bone al mi, mi danku al vi.“

„Old Shatterhand bonas al ĉiuj homoj. Ĉu li eble revenos?“

„Tion mi pensas. Tiam mi kunvenigu Pida:n, kiu estos mia amiko kaj frato.“

„Ĉu vi rajdos al li?“

„Jes, mi renkontos lin.“

„Do diru tute nenion pri mi! Neniu, escepte de la fratino, eksciu, kion mi faris.“

„Vi estus farinta plu, mi scias tion. Donu vian manon al mi, ke mi povas danki al vi!“

Ŝi etendis ĝin al mi.

„Via fuĝo sukcesu plene!“ ŝi diris haste. „Mi nun foriru, la fratino afliktiĝas pri mi.“

Antaŭ mi povis eviti tion, ŝi tiris mian manon al siaj lipoj, kaj forhastis. Mi staris kaj aŭskultis post ŝi. Vi bona knabino!

Tiam mi paŝis en la tendon kaj unue palpumis antaŭe ĝis la lito. Sub tiu estis, volvitaj en kovrotukojn, la pafiloj. Mi elvolvis kaj pendigis ilin de miaj ŝultroj. Tranĉilo kaj revol- veroj tieis, ankaŭ la selo kun la poŝoj. Kvin minutoj jam ne estis pasintaj, kiam mi forlasis la tendon kaj iris reen al la arbo de la morto, pro meti la selon sur mian ĉevalon. Kiam tio estis farita, mi kliniĝis al la gardistoj. Ili estis rekonsciĝintaj.

„La militistoj de la kajovajoj ne havas feliĉon pri Old Shatterhand“, mi diris al ili per obtuzigita voĉo. „Ili neniam vidis lin sur la torturfosto. Mi rajdos al Pida, pro kapti Santer:on kune kun li, kaj mi traktos Pida:n kiel amikon kaj fraton. Eble mi revenos kun li. Anoncu tion al la ĉefo Tangua kaj diru al li, ke li ne afliktiĝu pri sia filo, ĉar mi gardos lin! La kajovajoj estis amikece al mi. Transdonu al ili mian dankon kaj la promeson, ke mi neniam forgesos, ke ili faris tion. *Hongh!*“

Mi ekprenis la kondukilon de mia nigra virĉevalo kaj forkondukis ĝin, ĉar mi ne jam volis rajdi, pro ne veki iun. Nur kiam mi estis sufiĉe malproksimiĝinta, mi iĝis sur la selon kaj elrajdis sur la prerion.